7-a JARO, N-o 337 LEIPZIG, 19. / 3. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO



SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbera, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | APERAS SEMAJNE

AL LA TUTA SAT-ANARO!

En la n-o 335 de "S-ulo" ni publikigis ekstrakton el "Internaciisto", kiu plenlume vidigas la celon de la skismigantoj. *Ili mem formetis la maskon.* Ni povus sekve sen pliaj klarigoj tiri la konsekvencon, kiel ni anoncis. Ni preferas tamen *lastfoje* liveri al la SAT-anoj kelkajn klarigojn pri la estiĝanta situacio en nia Movado. Tiucele ni turnas nin al ĉiuj inter vi, kiuj havas la kapablon k la sinceran volon kompreni, al ĉiuj, kiuj estas inklinaj malvarme, senpasie, objektive pripensadi.

Por havi absolute klaran bildon pri la nuna stato en SAT, necesas iomete koni la historian evoluon, kiu ĝin kreis. Ni tial preterpasigos antaŭ viaj spiritaj okuloj en tute konciza k preciza formo, limigante nin al la citado de sekaj faktoj k datoj, la ĉefajn okazintaĵojn en la vivo de nia Asocio.

Marto k aprilo 1923: Aperas flugfolioj de la Komfrakcio de CK SEU en kiu estas kondamnata la ideologio de SAT k proponata proklami dum venonta SAT-Kongreso (aŭg. en Kasel) aliĝon de SAT al Komintern.

4./10. aŭg. 1929: Kongreso de SAT en Lajpcig. La Komfrakcio atakas sisteme dum la tuta kongresdaŭro la SAT-direkcion k speciale K-don Lanti. Drezen kulpigas lin pri "politikaj, taktikaj k personaj *krimoj*". Malgraŭ tiaj kulpigoj la gvidrezolucio kun fido al la Plenum-Komitato trovas *unuaniman* akcepton.

Septembro 1929: Drezen raportas antaŭ la Moskva aktivularo pri la 9-a Kongreso laŭsence jenon: "SAT estas 'flaveta' organizo, ĝi estu nia *provizora* restadejo k *SEU devas akceli la estontan gvidadon k superecon je la tutmonda laborista esp. movado.*" (Vd. n-on 304 de "S-ulo").

Novembro 1929: En la unua n-o de "Kunligilo", oficiala organo de la Internacia Komunista Esperantista Frakcio (I.K.E.F.), kiun ricevas nur Frakcianoj, sed kiu tamen trafis en niajn manojn, oni povas legi jenon: "Fakte por ni SAT estis ĝis nun valora de du vidpunktoj: 1. kiel movado, frakasanta k iom post iom per si anstataŭanta la neŭtralan movadon esperantan k 2. kiel asocio, prezentanta al ni certajn eblojn doni informojn pri la laborista k la klasbatala movado al la SAT-anoj k per ilia helpo al la laboristoj — proletoj diverslandaj. — La klasbatalaj esperantistoj k intelektaj fortoj per ili reprezentataj estas jam nun sufiĉe maturaj por povi ankaŭ memstare, sen interveno de politike senforma asocio simila al SAT, — daŭrigi laboron de la frakasado k anstataŭado de neŭtrala movado. Do pleje gravas por ni la dua rolo de SAT. Sed utiligi la presorganon de SAT ni povas nur kondiĉe, ke tiuj presorganoj ne celu propagandi iujn ideojn skismajn oportunismajn vualantajn la klasbatalajn celojn k taskojn de tutmonda proletaro . . ."

"...Se tiu fuŝado oportunisma daŭros k se ni ne povos en kadroj de SAT ĝin malhelpi, tiam nature ni devos konstati, ke SAT perdas por ni ĉian valoron, utiligi SAT-gazetojn ni plu ne povas, k ĉiuj klaskonsciaj k klasbatalpretaj revolucianoj devas foriri el SAT k serĉi novajn vojojn por efektivigi sian revolucian agitpropagandan peresperantan laboron inter la laboristoj diverslandaj."

12. febr. 1930: La kredito de SAT en Moskvo ĉe CK SEU kreskas daŭre. Ni atendas pluan presigon de SAT-libroj en Moskvo k instrukcias pri tio al CK SEU. Ni konstatas, ke la admin. sekr. de CK SEU, K-do Demidjuk, ne plu respondas al cirkuleroj k protokoloj de la Direkcio kiel Plenum-Komitatano.

29. aprilo 1930: Atentigo de l' Administranto, ke la ŝuldo sur la konto en Moskvo sumiĝas je pli ol 12 mil germanaj markoj. Ne presiĝis libro en Moskvo por SAT.

30. aprilo: Ni ripetas insiste la instrukcion pri libropresigo en Moskvo.

23. majo: La Administranto de SAT en Lajpcig sin turnas al la Ĝenerala Sekretario de CK SEU, Drezen, kun insista peto, ke li persone klopodu por ke mono al SAT estu sendata. Responde ĉi tiu lasta skribis, ke li ne konsentas fari tian klopodon. (Teksto de la poŝtkarto aperis en la n-o 301 de "S-ulo"). — Pro nericevo de nia mono k financa mizero ni ne plu povas akcepti mendojn sen mono el Sovetio, tamen la kurantajn abonojn ni daŭrigas al niaj sovetiaj K-doj.

27. majo: Ni denove ripetas nian instrukcion pri libropresigo en Moskvo.

31. majo: La Administranto informas, ke je tiu dato nia kredito en Moskvo kreskis je pli ol *15 mil* markoj germ., k ke de marto ĝis majo SEU pagis nur 257 dolarojn.

8. junio: K-do Demidjuk sciigas, ke en majo la popolkomisaro por financoj informis CK SEU ne plu doni valuton por transpago al SAT ĝis *oktobro*.

25. junio: Nova instrukcio al Demidjuk zorgi pri libropresigo en Moskvo, kun plena libero al CK SEU elekti mem la presotaĵon. — Rekomendita letero al K-do Rublov (Odeso), eks-sekretario de Literatur-Komisiono, por finordigi la sendon de

manuskriptoj por presigo al Moskvo[1].

10. julio: Konigo de la situacio al la legantoj de "S-ulo" (en n-o 301).

3./7. aŭgusto 1930: Kongreso en Londono. La 4-an estas legata *minaca telegramo de CK SEU* (Moskvo), kiu instigas al malfido kontraŭ la Direkcio k samtempe invitas la XI-an en Moskvon. Opozicio (triono de l' ĉeestantoj) atakas sisteme la gvidantojn de SAT.

7. aŭg.: Kunsido de CK SEU en Moskvo kun skismigaj decidoj, en kiuj partoprenas K-doj Besler k Riĥter (Lajpcig) kiel "reprezentantoj de GLEA" (vd. tekston en "S-ulo" n-o 315, "Isto" n-o 1).

15. oktobro: Aperas n-o 1 de opozicia gazeto "Isto". En tiu ĉi n-o estas alvokite, ke la mono kolektita por la "Esperantista Traktoro" ne plu estu sendata al la Administrejo de SAT, sed al la redakcio de "Isto". Dume je tiu ĉi sama dato SAT ŝuldas 67 000 francajn frankojn al diversaj kreditoroj k staras ĉe la rando de bankroto. — Pasis oktobro, tamen la promesita mono ne alvenis.

En novembro: Ekfunkcias opozicia libro-eldonejo, protektata de CK SEU k GLEA-estraro (EKRELO en Lajpcig).

3. nov.: Laŭ nia komisio nia presejo "Peuvag" klopodas por havigi al si monon el Moskvo k sukcesas ricevi 1000 mk.g. Ĝi atingas, ke ekde januaro 1931 ĉiumonate 1000 markoj povos esti sendataj.

Meze de novembro: Multaj sovetiaj K-doj plendas pro nericevo de la gazeto, kvankam en la Adm. oni regule k akurate ekspedis ĝin.

1. dec.: Insista letero al K-do Rublov (Odeso) por scii, kion li faris pri tie pretigitaj manuskriptoj (vd. sub 25. 6. 30).

26. januaro 1931: Ni ree insiste skribas al Demidjuk pri presigo de libroj en Moskvo por SAT.

27. jan.: Rekomend-letera admono al Rublov pro *nerespondo al nia letero de 1. dec. 1930.*

31. jan.: K-do Lerĥner informas, ke li ne ricevis eĉ 1 kopekon el Moskvo, malgraŭ tio, ke dank' al la klopodoj de nia presejo "Peuvag" partopagoj de l' ŝuldo devis okazi ekde januaro (vd. sub 3. 11. 30)[2]. — Ni donas skriban rajtigilon al la presejo, por ke ĝi denove provu per sia influo ricevi monon de nia konto en Moskvo por presigo de la Jarlibro.

10. febr.: Sep verkoj estas presitaj en Moskvo je la nomo de ... EKRELO! — Dume neniu SAT-verko estas presita tie.

Laste: En "Isto" n-o 9 aperas **instigo al bojkotado de ĉiuj SAT-organoj** (vd. tekston en la n-o 335 de "S-ulo").

Tiuj sekaj faktoj parolas tre elokvente. Estas klare, ke tuj post la Lajpciga kongreso la areto da memelektitoj, kiuj gvidas la Komfrakcion, starigis duvojan planon: 1. ĉu kapti en la manojn la gvidpostenojn en SAT; 2. aŭ, en okazo de malsukceso, starigi konkurencan organizon t. e. fari la skismon k samtempe friponi la SAT-monon.

Ĉi tiun lastan vojon devis sekvi la subfosantoj, post sia malvenko ĉe la X-a Kongreso en Londono.

Per demagogiaj procedoj, per mensogoj k kalumnioj, ili sukcesis trompi k delogi kelkajn aretojn da SAT-anoj. Sed la granda plimulto restas fidela al la ĝisnuna, lojala k senpartieca gvidado de SAT. Hodiaŭ la trompitoj havas la eblon vidi klare la eraran vojon, sur kiu ili ekmarŝis je la malprofito de la lab. esp. movado. Ĉiaokaze alvenis la horo por haltigi la detruan laboron de la konsciaj subfosantoj k de la naivaj trompitoj. Ĉiu povas facile konvinkiĝi, ke la opozicio ribelas kontraŭ nian Statuton k friponas. Sekve por meti finon al tia netolerebla stato, ni decidas: 1. ĉiuj respondecaj gvidantoj de la opozicio estas eksigataj el SAT; 2. ĉiuj aliaj subskribintoj de la "Deklaro" de la opozicio, kiuj, en tempodaŭro de 2 monatoj, ne estos deklarintaj sian malaprobon al la lastaj elpaŝoj de la opozicia gvidantaro, estos eksigataj; 3. ĉiuj, kiuj post apero de ĉi tiu nia komuniko solidariĝos kun la opozicio, estas eksigotaj.

La lojalaj SAT-anoj, kiuj jam kelkfoje riproĉis al ni pro nia trolongdaŭra malsevero, devas kompreni, ke ni preferis atendi ĝis la tago, kiam ĉiu K-do povas vidi en plena lumo la friponaĵojn de la "Internaciisto"-anoj. Tiu tago alvenis ...

La atmosfero en SAT refariĝos pli pura. Ĉesos denun sur la pĝ. de "S-ulo" la polemikoj, kiuj naŭzis tiom da K-doj; ĉiu el ni povos dediĉi sian tutan energion al pozitiva laboro. SAT restas, kiel ĝi estis ekde sia fondiĝo, malfermata al *ĉiuj tendencoj el la laborista klasbatala movado k sendependa de ĉiu ajn partio.*

Malgraŭ ŝtelo de granda monsumo ni tamen sukcesis eviti bankroton; iom post iom per memofera laboro k malavaro de lojalaj SAT-anoj ni sukcesos likvidi niajn ŝuldojn k ni ne dubas, ke ĉe la fino de ĉi tiu jaro ni povos aperigi novan Jarlibron. Bedaŭrinde ni ne povas nun forigi la baron, kiun starigis la CK SEU inter SAT k la multnombraj Sovetiaj K-doj, kiuj kore k spirite restas al ĝi ligitaj. Ni trovos rimedojn por ne tute perdi kontakton kun ili. Tia stato tamen ne daŭros eterne; ni havu paciencon. Ne povas esti, ke la friponeco havu daŭran potencon. Ni havas esperon. En 1932 ni certe povos per firmaj paŝoj rekomenci nian marŝadon antaŭen.

Al la laboro!

LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

Aber, Banmer, Glodo, Kaŝon, Lanti, Lerĥner, Marso, Stej.

LA KONTROL-KOMITATO DE SAT

L. Bergiers, G. Stalens, M. van Aelst.

[1] Necesas klarigi ĉi tie, ke ni publikigis en la n-o 321 de "S-ulo", ke 5 manuskriptoj troviĝas en Moskvo por presigo. Laŭ nekontrolebla aserto de K-do Demidjuk estis nur 2, tial ke Rublov ne plenumis nian komision. Sed tio ŝanĝas nenion en la fakto, ke la **2** manuskriptoj kuŝantaj en Moskvo ne estis presitaj.

[2] Eĉ ĝis la 14-a de marto ne envenis 1 kopeko el Moskvo la kason de SAT.

AL DOGMULOJ!

Dogmuloj aplombe deklaras:
Ne eble, ke ni nun eraras,
la ĝustan ideon ni havas,
en ĉiuj okazoj ni pravas!
Nur nia batal-organizo
kun tia belega devizo
kapablas eksavi sur tero
homaron el ĉia mizero!
— Ĉu ni ne eraris pli frue? —
Jes, ofte, — sed nur evolue,
momente ne plu, — ni asertas!
Krom tio — ni ĉiujn avertas
pri tiaj personoj kun emo
al propra pensado, — jen temo
danĝera por ĉiuj dogmuloj
kun pretaj, lernitaj formuloj;
ĉar tiuj dubemaj friponoj
— eĉ spite je niaj admonoj —
nur sekvas prudentan logikon,
kontraŭas doktrin-fanatikon!
Por ni ankaŭ estas danĝero,
ke ili en la maniero
de nia batalo ekvidas
la kaŭzon, per kiu dividas
ni unuec-fronton proletan,
— por venko necese kompletan.
? ! ? ! . . . . ? !
Ĉu eble ĝi estas la vero?
Do — skismo nur pro maltolero —!?
Jes, — eblas; — jam venas skrupuloj!
Ne! For! Ne! — Ni restas dogmuloj!

J. Burger (601).

ANTAŬ 60 JAROJ

Kiam ĝi klakis sur la tomboj kiel rido-skuo
La lasta salvofajr' k Tjer al si kredigis,
Ke ĉe l' pied' de l' ruĝa mur' Parizon li mortigis,
Ja nedetrueblon maltrafis lia detruo...
(M.-E. NEGELEN).

Ĉiu proleto legas kun admiro k emocio pri la heroaj agoj de l' Komunanoj, kiuj provis en 1871 realigi la popolregadon en Parizo, defende kontraŭ reakciuloj (Tjer k K.io) k alilandaj armeoj (prusoj). Se oni nuntempe gloras la Parizan Komunon kiel unuarangan revolucian okazon, oni tamen tro ofte forgesas pri la veraj motivoj, el kiuj naskiĝis la Komuno. Ni devas ekkoni, ke ĝia karaktero estas malpli s o c i a ol n a c i a. Unuagrade agitis la animojn de l' Pariza popolo la defendo de ĝia urbo kontraŭ la fremdajn invadintojn; ĝuste por tiu celo kreis la parizaj proletoj k respublikanoj k aliaj patriotoj sian provizoran registaron k riproĉis al la Versajanoj perfidon de l' patriaj interesoj.

La sekvantan tre koncizan priskribon ni ĉerpas el la konata "Ĝenerala Historio de l' Socialismo k de l' Sociaj Bataloj" de B e r (Beer)[1]. Ĝi klare prezentas la pozicion de l' Komuno en la historia evoluo. *R e d.*

La plej grava okazaĵo en la historio de l' Unua Internacio estas la batalo de l' Pariza Komuno (1871). La naskiĝon de l' Pariza Komuno oni povas dedukti el tri ĉefaj faktoj: 1. La german-franca milito, kiu rezultis de la tradicia franca politiko, malhelpi la unuiĝon de l' germanaj ŝtatoj; 2. la tradicioj de l' granda franca revolucio, en kiu la Pariza magistrato ludis konsiderindan rolon; 3. la disvastiĝo de l' Internacio en Parizo k la grandaj provincaj urboj, kiel entute de la socireformemaj ideoj.

La milit-sukcesoj de Prusio (1864, 1866), la fondo de l' Nordgermana Ligo (1867) k la alproksimiĝo al Sudgermanio (1868) havigis gravajn zorgojn al la franca diplomatio. Kiam poste ankoraŭ al princo el la Hohencolern-Sigmaringa dinastio estis proponata la hispana krono k de li akceptata (1870), Francio sentis sin minacita k falis en la embuskon de l' Bismarka diplomatio, ĉar Prusio estis tiel armee kiel diplomate plene preparita al la milito k atendis okazon, kiu povus instigi la francan registaron, por deklari al ĝi la militon. Ĉi tiu militdeklaro okazis je la 19-a de julio 1870. Komence de aŭgusto ekis la serio da bataletoj k batalegoj, kiuj baldaŭ iĝis malfavoraj al Francio. Komence de septembro Francio estis venkita. La 4-an de septembro 1870 ekribelis Parizo, renversis la imperion, proklamis Francion respubliko, starigis provizoran registaron de l' landdefendo, en kiu nur Gambeta ĝuste ekkonis sian taskon k plenumis ĝin tiom kiom eble, dum generalo Troŝu (Trochu), prezidanto k guberniestro de Parizo, dekomence ludis dubesencan rolon, ĉar li ne malpli malamis k timis la internan malamikon (la parizan proletaron k la respublikanajn elementojn) ol la eksteran malamikon (la prusojn). La 31-an de oktobro Blanki, kiu tiutempe ankoraŭ estis en Parizo, provis organizi pli kapablan registaron, sed la okazintaĵoj en la batalejoj ne permesis internan reorganizon. Ĉar ankaŭ la



armeoj starigitaj de Gambeta estis iom post iom venkataj, tiel ke je la fino de januaro 1871 devis esti komencataj traktadoj pri batalhalto. La 8-an de februaro la ĝeneralaj elektoj por la Naci-Kunveno (parlamento) estis okazigataj; ili rezultigis reakcian plimulton k reakcian registaron kun Tjer (Thiers) kiel ĉefo. La Kunveno kuniĝis unue en Bordo (Bordeaux), poste en Versaj (Versailles), de kie estis komencata la batalo kontraŭ la Pariza proletaro.

La 26-an de februaro la pacprovizoraĵoj efektiviĝis, kiuj — pro la fordono de Elzaso-Lotaringio — estis konsiderataj de l' tuta Francio kiel senekzempla humiligo k febre agitis la animojn. Precipe tio okazis en Parizo. La Pariza Nacia Gvardio, kiu estis kreita por la konservo de l' publika ordo k konsistis el multaj radikalaj k proletaj elementoj k posedis propran artilerion, formis fine de februaro Centran Komitaton, kiu, post kiam la Versaja registaro sub Tjer estis farinta sensukcesan atakon kontraŭ la Versajanoj k proklamis je 18. marto 1871 Parizon kiel aŭtonoman Komunon. *La Centra Komitato transformiĝis en provizoran registaron,* tio estas: *en diktaturon,* sed jam ok tagojn poste (26. marto) ĝi apelis al la ĝenerala balotrajto de Parizo, tio signifas: ĝi remetis sian povon en la manojn de l' suverena popolo de Parizo, kiu donis al si demokratan administracion. Kiel tia — kiel demokrata urbestrara administracio — la Pariza Komuno daŭris de 26. marto ĝis sia definitiva malvenko en fino de majo. *Ĝi do ne estis diktaturo,* ĉar ĝi estis formiĝinta per regulaj demokrataj balotoj k konsistigis *koalici-administracion* el membroj de l' Internacio, Blankianoj, Prudonanoj, burĝaj respublikanoj k seniluziigitaj patriotoj. La Komuno restus diktaturo, se la Centra Komitato difinita de l' Nacia Gvardio estus konservinta la povon ĝis fino k ne apelinta al la ĝenerala balotrajto. Tio estas grava por ekkoni la historian veron. La Komuno estis *koalici-administracio* k tial ne povis alveni al unueca sinteno, taktiko k celfikso. Tre indulgema, tamen sufiĉe klara estas la riproĉo de Marks kontraŭ la Centra Komitato pro ĝia demokrata skrupuleco k ĝia apelo al la balotrajto:

"Anstataŭ marŝi kontraŭ la tiame tute senhelpan Versajon, oni permesis al la ordo-partio refoje provi sian forton ĉe la balot-urno, kiam estis elektata je 26. marto la Komuno. En tiu ĉi tago la ordpartianoj interŝanĝis en la balotejoj bonfavorajn vortojn kun siaj ja tro grandanimaj venkintoj, samtempe murmurante en siaj koroj solenajn promesojn, siatempe sange sin venĝi." (Marks, Civilmilito en Francio, ĉapitro II). Kaj al sia amiko Kugelman, Hannover, Marks skribis tiam, ke la Centra Komitato faris du erarojn, kiuj povis sekvigi malvenkon. Unua eraro estis, ke la Centra Komitato — post la malsukcesa atako de l' Versajaj trupoj al Monmartr — ne marŝigis la Parizan Nacigvardion kontraŭ Versajon, por kapti la ordpartianojn. "Dua eraro: la Centra Komitato tro frue cedis sian povon por fari lokon al la Komuno. Refoje pro tro honesta skrupuleco." (Nova Tempo, vol. XX, 1, pĝ. 709).

Estas eraroj, kiujn faris la franca proletaro en 1848 k la germana proletaro en 1918/19. En ambaŭ okazoj la venka revolucio multe tro rapide nuligis la diktaturon k apelis al la demokrata elektrajto. Kaj en ambaŭ okazoj fine la socialismo estis venkata. El la supraj citoj de Marks oni povas parenteze ekkoni, ke Engels eraris, kredante, ke la Komuno estis proleta diktaturo.

[1] Germana original-eldono, Berlin SW 68.

NENIU TUŜU AL SOVETIO!

La antaŭnelonge en Moskvo finiĝinta procezo tiel nomata "proceso de la industriista partio" tre klare montris, ke la ĉiulanda proleta gazetaro pravas, kiam ĝi alvokas la laboristaron al singardo kontraŭ milito.

El tiu proceso plej evidentiĝas, ke unu el la ĉefaj — eble la ĉefa — malamikoj de Sovetio estas la franca imperiismo.

Estas memkompreneble, ke la kapitalistaro alrigardas al Sovetio timoplene. La kapitalistoj ja tre bone konscias pri tio: se niaj sovetiaj K-doj sukcesos — ili certe sukcesos! — konstrui socialisman socion, tiu fakto nepre stimulos la proletojn de la aliaj landoj fari la samon. Tial esperante malebligi tiun — por ili gravegan — tutmondan revolucion la kapitalistaj regantoj ĉiel provas malutili Sovetion. Li eĉ militus kontraŭ la socialistan landon . . . se ili estus certaj ĝin venki.

Ni proletoj de la tutmondo, ni sciigu al niaj regantoj, ke se ial ili militos kontraŭ Sovetion, ili fiaskos tiom pli plene, ke plejparto el ni, t. e. ĉiuj klaskonsciaj proletoj, aliĝos la ruĝarmeon! La heroeca gesto de nia K-do Marti renoviĝos milionope.

Niaj sovetiaj K-doj estu plej firme certaj ke la tutmonda proletaro konsideras Sovetion kiel nedetruendan kernon de l' estonta socialisma socio ampleksonta la tutan terglobon: tial ili fidu nin; ni ne toleros, ke iaj malbonfarantoj tuŝu al Sovetio! . . .

Estas vere, ke por malutili la socialistan landon, la kapitalistoj uzas aliajn rimedojn ol militon. Ili ekz. malebligas la eniron en sia lando de la sovetia merkato. Tiuvidpunkte la kapitalistoj ankaŭ ne trafos sian celon, ĉar vole nevole iam — verŝajne baldaŭ — ili estos devigataj toleri la eniron de la sovetiaĵoj. Tiuokaze ni tamen ne opiniu, ke niaj reakciaj regantoj fariĝis "bonkoruloj" intencantaj amindumi la posteulojn de la cara reĝimo. Ne. Ili faros tion devige, ĉar ili baldaŭ konstatos, ke kontraŭstaro al Sovetio estus malprofita por ilia propra lando.

Kio ajn okazos, ni zorge atentu la agadon de niaj burĝaj gvidantoj k ni estu ĉiam pretaj *malebligi, ke ili tuŝu al Sovetio!* *(55)*

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

La stato de l' senlaboruloj en Usono

Po miloj la senlaboruloj moviĝas tra la stratfendegoj de l' usonaj urbegoj, inter modernaj novekipitaj piramidkonstruoj. Nur el sub la trotuaro supreniĝas iom da varmo el hejtinstaloj. Se ekrigardo de policano trafas la "vagulon", ĉi tiu ne atendante ordonon silente direktiĝas al pli konvenaj por li mizer-kvartaloj. Tie ankaŭ estas la misiejoj de "savarmea" marko, kie unufoje tage eldoniĝas en varma ĉambrego supaĉo akompane de pastra edifo. Piaj okulturnoj estas la enirbiletoj, humila kapmallevado, preĝado, kantado estas la pago. Iuj mizeruloj iras de unu manĝejo al alia; tial la "Centra bonfara komitato" aranĝis, ke la manĝigo en la diversaj ejoj okazu samtempe. Nur plej bonŝancaj mizeruloj, ne la plej granda parto de l' senlaborularo, ĝuas la helpon de tiuj institucioj, kies administra aparato estas nutrata per mono ricevita dank' al helpalvokoj. Iafoje la senheredigitoj marŝas al urbdomoj, okazas interpuŝiĝoj k oni aŭdas malbonajn vortojn pri la usona sistemo.

Pri la enhavo de artikoloj aperantaj en "S-ulo" respondecas la aŭtoroj.

Por k kontraŭ asekuro al senlaboruloj en Usono

Kunvenis la ŝtatestroj el 7 orientaj ŝtatoj usonaj, aŭskultis ekspertizistojn pri adopteblo de "eŭropaj" senlaborul-asekuraj sistemoj. Planoj pluvis, sed neniu tuŝu "liberan konkuron". Neniu proponu (laŭ metropola gazeto) al "liberamaj usonanoj, ke ili estu paŝtataj kiel ĉevaloj, kiam ne bezonataj por treni".

Asekurleĝojn prezentas ĉefe tri organizoj (krom multaj grupetoj), nome: "Usona asocio por porlaborista leĝdono", socialista k komunista partioj. La proponoj similas inter si. La kompartia estas plej postulema favore al senlaboruloj. La rimedoj por elpeti la leĝojn tre diferencas. Ekz. la kompartio aranĝis multajn manifestaciojn tra la lando; ĝi faris agitadon por akiri milionon da subskriboj al petskribaĵo, kiun oni prezentis en februaro al la Vaŝingtona parlamento. La Usona Federacio de Laboristaro malfavore rigardis ŝtatan asekuron por senlaboruloj, tamen sub-instancoj moviĝas je ĝia favoro.

Sur radikala alo troviĝas du organizoj, kiuj kategorie rifuzas enviciĝi favore al asekuro, pro revoluciaj

La esperanto de la okuloj

"... Al juna altkreska viro estas elpuŝita unu okulo. La ankoraŭ sanga, ŝvele fermita okulkavo divenigas, ke la batoj, kiuj kaŭzis ĉi tiun akcidenton, falis nur antaŭ nelonga tempo. Maljuna viro estas skuata de febraj tremoj. Dume li premas ambaŭ manojn konvulsie sur sian ŝvelintan ventron. Al viro kun ruĝa barbo k Krist-kapo la sango fluas de la manoj, la delikatan k noblan vizaĝon de juna virino malbeligas ruĝaj strioj.

Longe ni rigardas nin unu la alian. Neniu kuraĝas paroli vorton. Kvar soldatoj gardas nin per bajonete armitaj pafiloj k ne deturnas rigardon de ni. Mi lernas baldaŭ ĉi tiun esperanton de la okuloj, kiu ebligas al ni interkompreniĝi, eĉ se ni parolas malsamajn lingvojn. Ĉiuj naciecoj k religikonfesoj estas reprezentitaj . . ."

Teruragoj okazis, okazas ankoraŭ — ĉu en Ĉinio? Turkio? Ne, en Meza Eŭropo. Oni estas preskaŭ impulse devigata rigardi la kalendaron, ĉu ni vere vivas en la dudeka jarcento k ne en la mezepoko. Oni turmentas homojn, same kiel faris la inkviziciuloj. Kaj tio okazas en la Hungario de Horti. Ne estas eble ĉion priskribi en la malvasta spaco de nia gazeto — kvankam ĝi tion meritus. Mi donis nur fragmenton, kiu jam sufiĉe karakterizas libron, kies enkondukaj vortoj estas:

"Kiu hontas pro siaj larmoj, ne legu tiun ĉi libron. — Virino estis enkarcerigita en la malliberejoj de Hungario. Ŝi ne suferis korpajn turmentegojn, ne la morton. Sed ŝi vidas k revenas hejmen al ni kun sanganta koro, turmentata de la suferegoj de l' aliaj."

Tiujn ĉi enkondukajn vortojn skribis Henriko Barbus (Barbusse) por la libro: "La karceroj de Budapeŝto" de Sandor Kemèri. Sinjorino de Bölöni, edzino de konata hungara verkisto k elmigrinto, vizite venis en sian hejmon en Budapeŝto. Oni denuncis ŝin kiel spioninon k ŝi devis kelkajn semajnojn vivaĉi en la malliberejoj de plej reakcia terorlando en Eŭropo. Kion ŝi travivis, kion ŝi vidis, ŝi priskribis en la supre menciita libro. Por pruvi ŝian valoron kiel atestantino, necesas mencii por eblaj dubemuloj, ke s-ino de Bölöni estis sekretariino de Anatolo Frans (France).

Mi titolas mian artikoleton "La esperanto de la okuloj". La aŭtorino uzis ĉi tiun esprimon, k ni esperantistoj diskonigas per la buŝa esperanto la ekziston de tiu ĉi dokumento, kiu vere meritas esti konata de ĉiuj homoj, kiuj ne volas, ke suferantaj okuloj parolu la esperanton de viktimoj, sed ke ĝojaj homoj komprenigu sin per la esperanto de liberaj estaĵoj.

Al. Ramŝak (10 504).

motivoj. "Industriaj Laboristoj de l' Mondo" (I. W. W.) rekomendas anstataŭ sieĝi urbdomojn ĉirkaŭi per pikedoj la fabrikojn por eldevigi mallongigon de l' laborhoroj, plilarĝigon de labortaĉmentoj en la fabrikoj ktp. Socialista Lab. Partio opozicias al asekuro, ĉar cedo pri ĝi nur daŭrigus la kapitalismon k ne vidigus al laboruloj k senlaboruloj kiel solan esperon la abolicion de l' kapitalismo.

Kompilita el
"Ĉirkaŭ la Globo" (n-o 3) (1307).

El Francio

La elpaŝo de l' 22 sindikatanoj divers-sindikataj, kiuj manifestis por la restarigo de l' sindikata unueco en Francio (vd. raporton pri tio en n-o 324, pĝ. 82), trovis sufiĉe vastan eĥon, k nuntempe neniu francia laborista gazeto prisilentas tiun ĉi movadon, notante ĝin ĉu en aproba ĉu en malaproba senco. La sindikata unueco, laŭ la iniciatintoj de l' movado, povus efektiviĝi nur, se la sindikatoj estus sendependaj de ĉiu ajn politika partio. La iniciatintoj mem konscias bone, ke la vojo al la celo estos longa, sed aliflanke enregistras kiel sukceson la fakton, ke la diskutado pri la problemo daŭras; ili admonas siajn subtenantojn resti en la sindikatoj respektivaj, al kiuj ili apartenas, por tie labori por la realigo de l' por venontaj bataloj tiom bezonata unueco.

Depost la 4-a de februaro strikas la tekslaboristoj en Kur (Cours), Ron (Rhône)-regiono sekve de la provoj de l' entreprenistoj malpliigi la salajrojn. La kompanioj de minejoj en la nordaj provincoj minacas siajn dungitojn same per salajr-malaltigo k senlaborigo. *P. K.*

La fervojista movado en Hispanio

Pro tio ke la ministro por publikaj laboroj malpermesis al la fervojistoj esprimi publike sian opinion, regas malkontento inter la fervojistaro de l' Bilbao-a regiono. La direkcio de l' fervoj-kompanio priservanta la urbetojn Amorebieta, Guernica k Pedernales, decidis interrompi sian trafikon k lokaŭti la personaron ekde 31. marto. Tiu ĉi decido estas motivigita per manko de enspezoj, sekve de terfalo, kiu interrompis komplete parton de la reloj al Oca. La decido de l' kompanio ekmovis la fervojistan sindikaton, kiu intencas interveni. *B-ano.*

Kontraŭfaŝisma agado en Italio

En Caviccio apud Komo 1200 laboristoj, precipe virinoj, laborantaj en silkfabriko, manifestaciis publike kontraŭ la redukto de l' salajroj ĝis 25%, rifuzante plue labori. Ili fikriis kontraŭ la reĝimo, la fabrikposedantoj k la faŝistoj-sindikatestroj. Policanoj k soldatoj, pro la firma sinteno de l' manifestaciantoj, limiĝis al kelkaj arestoj. Preskaŭ ĉiuj arestitoj estis virinoj, kiuj kantante revoluciajn kantojn eniris la arestejon. Post 3 tagoj ili estis liberigitaj pro la minaca sinteno de l' loĝantaro. — Aŭtomobilo traveturanta Genovon distribuis al la laboristaro adresitajn kontraŭfaŝistajn flugfoliojn, kiuj treege emociis la loĝantaron de tiu urbo. Ĝis nun la polico ne sukcesis eltrovi la aŭtomobilon nek la distribuintojn. *Laŭ Italia.*

Ĵus aperis la 14-a volumo de
B BLIOTEKO DE SENNACIULO
Ĝi entenas sub la titolo
NIA TEATRO
du teatraĵojn, parolĥorojn k versaĵojn speciale taŭgajn por deklamo.
64 paĝoj. Prezo 0,60 mk. g.
Libro tre utila por ĉiuj grupoj k rondoj!
Mendu ĉe Administrejo de SAT, Leipzig O. 27.

TAGO EL MIA VIVO

Delonge ni ne plu presigis "Tagoj"n en "S-ulo", kvankam ni posedas ankoraŭ kvanton da ili. Ĉefa motivo ja estas manko de spaco. Tamen, se eblos, ni aperigos la ricevitajn manuskriptojn por tiu rubriko. La sekvanta ŝajnas al ni aparte interesa, ĉar ĝi venas el Suda Ameriko k krome de terkulturisto. *Red.*

Eble mi estas la unua terkulturisto, kiu raportas pri vivo k laboro sur kamparo en "S-ulo". Pro tio mia "Tago" eble estos iom speciala.

Mi troviĝas en la teritorio Misiones en Norda Argentino. Ĝi estas lokita iom pli ol subtropika, sed ĝenerale havas sanigan klimaton. Mia agokampo estas propra terpeco, sur kiu mi libere, laŭplaĉe laboras.

Somera tabakrikolta tempo. Iom antaŭ la sunleviĝo (5-a horo) mi ellitiĝas, ofte eĉ pli frue, ĉar terkulturisto ne havas fiksitajn laborhorojn. Iufoje li laboras 14—16 horojn, iufoje nur 5—6 tage laŭ la vetero ktp. Vestiĝante simple per ĉemizo k pantalono, lavante min, manĝigante la kokojn, hakante lignon por kuirado k prizorgante aliajn diversajn laborojn en la korto, mi pasigas la matenhorojn, ĉar frumatene oni ne povas labori sur la kampo pro ega roso.

Je la 8-a mi matenmanĝas panon kun graso aŭ plej ofte kun mielo k trinkas kafon aŭ *mateon* (nacia teo, farita el folioj de la *jerba-mate-arbo*). Ĝi estas pli saniga ol kafo aŭ ĉina teo.

Manĝinte, mi ĝis la 10-a aŭ 11-a laboras en la kampo, deŝirante k hejmenportante tabakfoliojn sub la tegmenton (remizon), kie mi dum la varmegaj tagmezaj horoj laboras. Post la 11-a mi prizorgas k preparas tagmanĝon, k dum ĝi kuiriĝas, mi disspecigas la tabakon k tirfiksas ĝin je metalfadenoj por pendigi ilin sub la tegmento.

Inter la 12-a k 13-a mi ĝenerale tagmanĝas. La manĝo varias ĉiutage laŭ sezono. Terpomoj (manioko = speco de tropika terpomo), fazeoloj, diversaj legomoj, fruktoj ktp. estas la ĉefaj nutraĵoj. Sed por la ordinara homo la porka viando estas ĉefaĵo, la danko k sekvo estas — eterna malsaneto. Mi ne estas malsana.

Manĝinte k puriginte la manĝilaron, mi ripozas iom aŭ komencas denove ĉe la tabako ĝis la 16-a aŭ 17-a horo. Tiam mi ree hejmenportas tabakon el la kampo por la sekvanta mateno, aŭ ŝprucigas la ankoraŭ starantan tabakon per speciala por ĝi veneno kontraŭ insektoj.

Post la sunsubiro mi preparas vespermanĝon, k dum ĝi kuiriĝas, mi banas min en proksima rivereto. Post la bano mi ĝenerale restas nuda ĝis mia enlitiĝo (aerbano). Veninte hejmen mi manĝas, ripozas iom kantante aŭ meditante. Poste mi legas, studas aŭ skribas ion. Inter la 21-a ĝis 22-a mi enlitiĝas por esti freŝa la sekvantan tagon k daŭrigi mian karieron.

Schiewe (5140).

Amu vian proksimulon!

La 17-an de aŭgusto 1914 ni soldatoj dormis en garbejo. Jam je la kvina ni ekmarŝis. Kien, ni ne sciis. Densega nebulo. Kelkaj husaroj estis rajdintaj ĉe la pinto de la brigado. Ni malbenis la militon, malgraŭ ke ni ĝis nun ne vidis la "malamikon". La vunditaj piedoj doloris. Subite ni ne plu uzis la straton, sed suprengrimpis monteton. Denove ni malbenis la militon. Kelkaj teren falegis, ĉar la vojo estis tro malbona. Preskaŭ ni estis atingintaj la montopinton; dekstre de ni en la valo estis videblaj la tegmentoj de domoj: Spontin en Belgio... Kvarope ni marŝis... Subite komenciĝis pafado, ĉirkaŭ la kapoj zumis la feraj kugloj. Unu oficiro k ok soldatoj (rezervarmeaj) kontrolis la situacion. Ni aliaj kisis intertempe la teron. Tra la vaporo saltegis kelkaj ĉevaloj sen husaroj.

Post kelkaj horoj brilis la suno. "Okupitaj" estis nur la pioniroj k la artilerio. Kontraŭ kiun? Kontraŭ civiluloj, kiuj estis trompitaj de la urbestro k *pastro*. Neforgesebla dimanĉo! La pastro estis dirinta al la loĝantaro:

"Ni devas mortpafi la *lastajn* germanajn soldatojn." Akurate je la sesa matene la batalo komenciĝis. Starante sur iu sterkujo estis mortpafita la pastro. Unu oficiro k kelkaj soldatoj mortis la "honorigan" morton, kelkaj estis vunditaj. Kiom da urbanoj mortis?? La sekvantan tagon ankoraŭ estis ekzekutataj 9 partoprenintoj.

Kiu kulpis pri la bedaŭrinda okazintaĵo? Unue, la fipastro, kiu trompis konscie la loĝantaron. Due, la loĝantaro mem, pro sia kredemo. Iu urbano, direktoro de ŝtonrompejo, kiu scipovis la germanan lingvon, rakontis al ni pri la afero. Li estis rekomendinta al la laboristoj ne kontraŭbatali la soldatojn. Sed nur kelkaj el ili obeis. La pastro pravas, ili diris.

Jam delonge mi estas liberpensulo, k precipe la fiago de tiu pastro pli certigis min pri mia nuna opinio. Sed mia plej granda deziro estas nun, ke ankaŭ la Spontinaj urbanoj estu lernintaj agi konsekvence. Mi supozas, ke jes. Pasis 16 jaroj, sed ĉiam, kiam estas densa nebulo, mi rememoras pri Spontin. *P. Michel (5525), Lajpcig.*

Kio estas "Normala Horo"?

"Normala Horo" — mallongigite "N. H." — estas mezuro de la estonto, same kiel ampero, vato, vaporĉevalo k. a. estas mezuroj de la nuntempo.

Por kio ni bezonos tiun mezuron? Ni bezonos ĝin por mezuri la laboron, kiun la gehomoj produktas per siaj forto k spirito. Kioma kvanto da produktita laboro estas N. H.? Ĝi estas la kvanto da laboro, kiun homo regule laborante, ne rapidante, sed ankaŭ ne forĵetante sian tempon, kapablas produkti dum unu horo. Ĉu ne estas rimarkinde, ke ni posedas mezurojn por ĉiuj grandoj k valoroj, escepte por tiu valoro, kiu ludas unu el la plej gravaj roloj en la homara vivo? Faktoro tiel grava, ke multnombraj ribeloj k revolucioj tra ĉiuj jarcentoj radikas en tiu manko.

Grandegan, fortan konstruon ni povas starigi nur sur bonaj fundamentoj, sen kiuj la konstruado malsukcesos. Ĉu vi iam vidis arkitekton, kiu konstruis domon sen antaŭe fiksitaj mezuroj, nur laŭ sia fantazio?

Prezoj sur la merkato aliiĝas k pro tio neniam povos esti mezuriloj por la produktita laboro, ĉar aliparte ili staras sub la influo de la rabista homara emo. Pro tio en la ŝtatoj de l' estonto, en kiuj ĉiuj sanaj gehomoj devos liveri difinitan parton da produktiva komuna laboro, unu el la plej gravaj fundamentoj estos la mezuro de la homara laboro, kiu estos samtempe mezuro por la valoro de la produktitaj varoj. Sen tiu fundamento ĉiuj klopodoj, por pli bone ordigi la interrilatojn de homoj, popoloj k de l' tutmonda homaro nur estos utopioj, de antaŭe kondamnitaj malsukcesi en la praktiko de la reala vivo. *Ariadno.*

Pri modo k laboristaro

En n-o 331 de "S-ulo" K-do Syversen pritraktis viran k virinan modon k kredas ricevi multajn riproĉojn, insultojn pro sia koncepto pri bona vestaĵo, korpo, vizaĝo ktp. Mi ne povas kompreni la K-dojn riproĉantajn al iu, kiu ŝatas bonan puran vestaĵon, korpon, vizaĝon por si, siaj familianoj k. a. Sed estas fakto, ke la miskompreno, la antaŭjuĝo el pasinta tempo pli malpli ankoraŭ regas inter la proletoj, ke laboristo kun bonorda vesto k korpo ne estas vera batalanto por socialismo. Ili opinias, ke laboristo devas resti proleta en sia ekstera konduto, vestmaniero ktp., ke bona vestaĵo estas burĝa afero.

Ne juĝu tiel senatente malrespektaj pri ĉiuj bone k pure vestitaj laboristoj, kiuj interne kelkfoje estas pli konvinkitaj socialistaj batalantoj ol frazisto aŭ malorde vestita homo. Ne ĉiam kredu, ke bonvestitaj homoj, laboristoj vivas en superfluo, ili kelkfoje havas pli multajn elspezojn, zorgojn pri vestoj, sia korpo, familio, estonto ktp. ol frazisto. Forta volo, ekstera ordemo, organizemo. klero ktp. instigis ilin agi tiel.

Ekzistas laboristoj kun malmulte da komprenemo por supraj aferoj, kiuj tute forgesas aŭ nescias, ke la progreso de l' laborista klaso, de l' socialismo, ne sole estas afero de la laboristoj k ilia batalo, sed de ĉiuj. Laboristojn bone k pure, simple vestitajn oni ŝatas ĉiam k ĉie; ili pli bone povas impresi aliajn dum varbado k senĝene movi sin.

Eduki, klerigi la lab. amasojn pri tio, estu ĉeftasko de lab. organizoj, institucioj en ĉiuj landoj, por ke la proverbo ne estu aplikata: "Kiel la ekstera aspekto de iu laboristo, organizo, popolo ktp., tiel ankaŭ la interna." Ne necesas vesti sin laŭ modo, kiel K-do Syversen ŝatas, plej multaj tion eĉ ne povas; ankaŭ en laŭmoda vestaĵo ne ĉiu bonaspektas. Sed nia vesto estu praktika, harmonia, simpla, konforma al kutimo k klimato de l' lando. Tia vesto ĉiam estas moderna k ne sole afero de burĝoj, sed ankaŭ de proletoj; ne estas hontinde, sed signifas progreson k karakteron.

Batalo por apartaj gildaj, klasaj, profesiaj, laboristaj vestoj kiel en pasinta tempo, estus malprogreso, same batalo por modo.

SAT-ano 1162 (Lajpcig).

MI VOLAS SCII...

En "S-ulo" n-o 331 mi legas en la artikolo "La socipolitika stato en Hispanio" i. a.: "Komunismo estas kruele persekutata k tamen ĝi enradikiĝas pli k pli. Sed dume la laboristaro estas regata de *socialistoj* k *sindikatistoj* k nerekte, per opozicio en la sindikatoj, influas ĝin la komunistoj." En "La Sindikatisto" (De Syndikalist) de 27. dec. 1930 (semajna gazeto de l' nederlanda anarko-sindikatista fakligo, kies ano mi estas) mi legas i. a.: "La registaro Berenger plentime observas la rapidan kreskadon de la revolucia sindikatista movado laborista. Ĝi klopodas haltigi ĉi tiun, aplikante la samajn perfortrimedojn kiel Primo de Rivera. Pliaktiviĝis la cenzuro, gazetoj estas malpermesitaj. La sindikatista ĉiutaga gazeto "Laborista Solidaro" (Solidaridad Obrera), kiu post sesjara paŭzo depost aŭg. 1930 denove aperis en Barcelono k en la fino de oktobro pligrandiĝis de 8 al 12 paĝoj, je eldonkvanto de 30—40 000 ekzempleroj, estas malpermesita por unu monato." Plie: "Pri la rilatoj inter reformista U. G. T.[1] k la sindikatista C. N. T.[2] diras la "Lab. Socia Asocio" (Associon Social Obrera), aperanta en la provinco Gerona, i. a.: "La diversaj agadoj de l' Madrida laboristaro estis ĉiam inspiritaj de la K-doj el C. N. T. Per tio ni povas ankaŭ kompreni, ke en la Ligo de l' lignaĵlaboristoj kun siaj 10 mil anoj oni jam ne fidis al la socialdemokratoj, k anarkistoj k komunistoj estis elektitaj por la gravaj funkcioj. Same okazis ĉe la Konstrufak-laborista Ligo kun 14 mil anoj, kiu eble baldaŭ estos gvidata de anarkistoj."

Kiu pravas, ĉu la raportanto en la "Sindikatisto", en kiu mi legas, ke anarkistoj k sindikatistoj estas tre aktivaj, aŭ K-do Madridano, kiu skribas, ke la socialistoj k sindikatistoj en H. "*pro timo perdi sian salajratan postenon, etburĝiĝas*", k neniel nomas anarkistojn? *J. Bout (15 396).*

[1] Unuiĝo ĝen. de Laboristoj.
[2] Nacia Konfederacio de Laboro.

ĴUS APERIS:
la marta kajero de
LA NOVA EPOKO
kiu enhavas militrakonton de ĉeĥa aŭtoro, versojn de sovetiano, "la sferofono", granda invento en kampo de muzikiloj de proleta esperantisto. La Lab. Esp. Movado antaŭ la Mondmilito (2-a daŭrigo).
Unuopa kajero: 0,35 mk g.
Abonu k abonigu la literatur-sciencan revuon de SAT!
Administr. de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

TRA ESPERANTIO

LA ESPERO

kantita de l' kongresanoj en Oksfordo*,

reskribita de H. M. H.

"En Oksfordo la kongresanoj soifis ne sangon sed bieron..."
(Schoofs.)

El tutmondo ni kongresi venis
en la sorĉe bela urb' Oksfordo.
Ĉiu el ni plenmonujon trenis
por ĝin lasi sur la angla bordo.

La veturon nian helpis bone
la "flugiloj de facila vento",
kaj la Himno nin regalis sone —
nin stelulojn el kvin kontinentoj.

Ni ne venis tien ĉi por ŝviti
laborante por la pac' sur Tero,
sed — por inajn korojn almiliti,
kaj plenigi ventrojn per biero...

Ni kontentas pri l' kongres-aranĝo,
sed indignas pro la fruekdormo; —
nialande post la vespermanĝo
nin amuzas dancistinaj formoj...

"Nia diligenta kolegaro"
amindumi lerte ne hezitas,
kaj pro tio trans la ter' k maro
U-Kongreson ĉiam ni vizitas.

"Sub la sankta signo de l' espero"
ni disiĝas ĝis venonta jaro;
al Krakovo kiam kun sufero
ni per ŝip' vojaĝos, vagonaro...

Do, en tiu pola urb' Krakovo
oni bon-konservu la bieron,
ĉar ni trinkos ĝin kun tuta povo —
nur pro tio amas ni l' Esperon!

11. Kongreso de SAT

Veturprezoj
(3. klaso) al Amsterdamo de:

	h. gd.
Antverpeno (Antwerpen)	4,80
Barcelono	37,—[1]
Bazelo (Basel) — tra Kolonjo	20,15
Belgrado (Beograd) — tra Pasaŭ	58,25
Berlino	19,90
Bruselo (Bruxelles)	5,60
Bukaresto — tra Pasaŭ	65,50
Budapeŝto — tra Pasaŭ	46,60
Dancigo (Danzig)	25,25
Frankfurto (M.)	16,25
Genovo	37,40
Gotenburgo (Göteborg)	42,30
Hamburgo	16,30
Helsingforso (Helsinki)	69,—[1]
Kopenhago	31,95
Kolonjo (Köln)	9,05
Lajpcigo (Leipzig)	20,15
Lisbono (Lisboa)	50,—[1]
Londono — per Batavierlijn	23,—
Ljono (Lyon)	23,35
Madrido	42,—[1]
Majenco (Mainz)	15,30
Marsejo (Marseille)	30,30
Milano — tra Kolonjo	33,15
Munĥeno (München)	26,10
Parizo (Paris)	12,80
Prago (Praha) — tra Bodenbaĥ	29,20
Oslo	58,40
Rigo	45,40
Romo — tra Kolonjo	47,35
Roterdamo (Rotterdam)	2,40
Sofio	66,95
Stambulo	81,20
Stokholmo	47,35
Torino	35,70
Varsovio (Warszawa)	33,30
Vieno (Wien)	35,50
Leningrado	123,—
Moskvo	99,—
Moskvo (Litvagono)	167,—

* Tie okazis, kiel sciate, la 22-a Universala Esp. Kongreso (de l' neŭtralaj esp-istoj) en aŭg. 1930.

[1] Signifas "proksimume". La prezoj estas en *holandaj guldenoj* k *nur por ira bileto.*

UNUECIGO DE L' PRONONCADO

Sub tiu titolo K-do Rud. Fiŝer proponas danĝerajn diferencigojn en esp-a prononco, tute ne oportunajn. Kie li trovis ian "regulon pri meza longo" en prononco de esp-o? Ĉu fine la gramatiko de esp-o fariĝos dekfoje pli dika, ol gramatiko de la plej komplika nacia lingvo? Laŭ tiu "regulo", antaŭ malmolaj konsonantoj la akcentataj vokaloj a, e, i, o, u, fariĝu mallongetaj? Aŭ mallongaj? Kial? Neniam ia ajn silabo estos tro longe, tro nete akcentata. Do, nenia diferencigo, nenia regulo estu en prononco de esp-o, krom akcento sur la antaŭlasta silabo. Ni plejeble bone prononcu ĉiun silabon de ĉiu vorto, k *ankoraŭ laŭeble pli nete, klare, longe, la akcentatan silabon.* Sufiĉos por plej bona kompreno k belo.

Sed ĉu tio estas "demando" en esp-o? Tute ne. Ni aŭdis japanojn, ĉinojn, siberianojn, rusojn, germanojn, hungarojn, anglojn, hispanojn, francojn, k neniam rimarkis neceson de alia klopodo ol plej nete prononci a, e, i, o, u. Nur ian utilon prezentas prononco de "mallongaj" vokaloj, ankaŭ akcentataj, en esp-o: Kiam ni ludos komediojn, komikuloj prezentu ekzemple afektemon de maljuna burĝo aŭ de nobelo "saltetante" sur vokaloj, kiel proponis K-do Fiŝer:

Maljuna burĝo: "Mmi propponnas, ke vvi reddonnu al mmi libberreccon!"

Por tia komika efekto tre utilos la gramatikaĉa komplikaĵo, kiun proponas Fiŝer.

*

Ni ĉiuj, en ĉiuj landoj, nur tro enkondukus en esp-o, se ni ne atentus pri tio, malviglaĉan kutimon flustri anstataŭ prononci, gluti silabojn, malfortigi vokalojn, rapidegi parolante ĝis balbutado. Oni neniam ŝparas tempon prononcante tro rapide. Kontraŭe, oni ne komprenigas sin, oni devas ripeti, reripeti, malŝparante sian k alies tempon, same kiel skribaĉante oni misuzas okulojn k tempon de legonto ... k atingos paperkorbon.

Ni pristudu parolmanieron de teatristoj, de oratoroj, kiuj estas teknikistoj pri parolado: ili prononcas nete ĉiun silabon. Ni imitu ilin sisteme, studeme.

Neniam estos tro longa la akcentata vokalo. Oni ĉiam pekas, ĉar oni tro glitas sur multaj siláboj. Kial proponi oficialigi glitadon k saltetadon sur akcenthavaj vokaloj? Esp-o havas nur kvin vokalojn. Ĉiu klopodu bone diri a por a k neniam e, e por e k neniam i, o por o k neniam a. La plej klaraj a, e, i, o estas la plej bonaj. La vokalo u tute ne riskas dubojn. Ni *multe kantu,* ni legu versojn k belan prozon, por kutimiĝi je bela prononcado de esp-o, kiu prezentas la samajn fortajn belojn, kiel latina prononco, kiel tiu de multaj rusaj aŭ polaj vortoj, kiel tiu de hispana lingvo, de multaj negraj lingvoj, kie a, e, i, o, u ankaŭ sonas nete k pure.

Tio sufiĉos por belo k klaro de esp-o, sen inventi longajn, longetajn, mallongetajn k mallongajn silabojn! Kia invento danĝera! Neniam ĝis hodiaŭ mi aŭdis nek spertis ion pri tiaj komplikaĵoj en esp-o, kiuj estus mortigaj por nia lingvo. *Jief.*

Por relative tre modera sumo

vi povas akiri libron de daŭra valoro:

PLENA VORTARO DE ESPERANTO

La unika lingva konsultilo por ĉiu esperantisto!

536 paĝoj. Form. 14×20 cm.
Prezo: bindita 10 mk. g., broŝ. 9 mk. (afrankite).

SAT *23, rue Boyer, Paris XX, aŭ Colmstr. 1, Leipzig O 27.*

TRA LA MOVADO

KRONIKO

AŬSTRIO. La plenkunveno de ALLE (aŭstria LEA) okazos 5/6. aprilo en Vieno (Wien XII, laborista hejmo). La grupo en Mirccuŝlag (Mürzzuschlag) aranĝis okaze de vintrosporta festo specialan festvesperon je 7. 2. por la ĉeestantaj esp. sportuloj. En la festprocesio ĉi lastaj (ĉ. 50) marŝis kiel aparta grupo kun 2 esp. standardoj. — *FRANCIO. Parizo.* La grupoj de la Pariza regiono eldonas nun dumonatan presitan informilon. La Pariza grupo havis fine de l' jaro 107 membrojn (anstataŭ 114 en antaŭjaro). Oni devas noti aldone, ke kelkaj membroj el la ĉirkaŭurba regiono forlasis la centran grupon por fondi grupon en sia propra loko. La kunvenojn vizitas kutime 25—30 personoj. — *GERMANIO.* La unua asocitago (kongreso) de Socialista Esp. Asocio okazos 23./25. majo en Frankfurt (Majno).

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La hinda esperantisto L. Sinha, kiu kiel propagandisto travojaĝis Estonion de septembro ĝis decembro 1930, faris tie 62 lekciojn al 12 200 personoj en 34 lokoj. Aranĝintoj de l' lekcioj estis kutime la lokaj klerigaj, abstinencaj k junularaj societoj. Lastatempe venas el multaj lokoj informoj pri novaj kursoj k studrondoj, mendoj pri literaturo k instruistoj.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Julio Baghy, HURA! Eld. Literatura Mondo, Budapest. 411 pĝ. Form. 13×19. Prezo: pengoj 8,20 broŝ., 9,30 k 11,20 bind. (Havebla ĉe Admin. de SAT).

Baghy, kiel cetere ĉiu homo sentema, idealema, kunpuŝiĝinte kun la besto-homo k socio — suferas. Sed li estas ankoraŭ feliĉa, ĉar spite la profunda doloro, kiu instigas al elverŝo de sufero, venĝemo k furiozo, li restas optimisto. Li kredas, ke nova Homo ekestos!...

Jen la fono de l' libro. La prologo estas majstra. Poste la grimaco — tiel nomas la libron la aŭtoro — estas interesa, spite tio, ke kelkaj partoj tro longiĝis. La fantazia lando de Baghy estas simila al ĉiuj aliaj: en ĝi regas la deziro de mono, nur de mono...

Baghy, per la buŝo de Tamara, kiu reprezentas la idealismon en la libro, imagas al si la plibonigon de la soci-ordo, per la kunfandiĝo k kunfratiĝo de etburĝa k laborista klasoj en unu ideologion. En sufiĉe longa sceno li esprimiĝas kontraŭ la komunismo, kiun defendas per juneca ardo Ivan, frato de Tamara.

La vipado al la socio, krom en la antaŭparolo, estas tre delikata k la herooj povas sen ruĝiĝo sendi dankon al la aŭtoro. La priskribitaj sociaj karamboloj estas laŭ la nun reganta moralo la sole — ekzisteblaj...

La lingvo estas bona, simpla k klara. Neologismoj ne ĝenas, kvankam ni bedaŭras la uzon de kelkaj, kiel ekz. la harstarigan *darfi; ŝezlono* (certe preseraro anst. *ŝezlongo*).

S. Grenkamp.

J. Stalin, Kulturo nacia k internacia. Trad. G. Demidjuk. 31 pĝ. Form. 12×15. Prezo: 0,20 mk. g. Eld.: EKRELO, Leipzig.

En 7-paĝa antaŭparolo por 16-paĝa verketo de Stalin: „*Kulturo nacia k internacia*“, Drezen eraras (kiam li ne kontraŭdiras sin mem) tiom terure, tiom danĝere, ke miaj marĝenaj rimarkoj, komence demandaj. prosurprizaj, fariĝis tuj vigle indignaj, k ĉiam pli indignaj ĝis finlego de tiu “antaŭtriono“, kiu pretendas anonci la du trionojn de Stalin.

En siaj du trionoj, Stalin batalas, tre bonspirite, kontraŭ *du* en Sovetio evitindaj eraroj: *Unu* estas emo al tutrusa imperiismo (konsideri ruslingvon kiel unueclingvon por Sovetio, rusan kulturon kiel unueckulturon). *La dua* eraro estas emo al lokaj ŝovinismoj (tro-naciigi, en ĉiu aparta lingvo, la naciajn kulturojn en Sovetio, ne sufiĉe fortigi la internacian enhavon en la diverslingvaj kulturoj).

Sen proponi esperanton k sennaciismon kiel nurajn rimedojn kontraŭ imperiismo *k* regionismo, ni rimarku, ke sennacia kulturo tute helpas al Stalin en tiu lukto: *Neniu bone edukita Sennaciulo povas fariĝi denove imperiema nek regionema (naciema)*. Por li, tiuj du religioj, naciismo k imperiismo[1], estas strangaĵoj, superstiĉaĵoj kiel katolikismo (imperiemo) k totemismo (nacikulturemo).

La antaŭtriono de D. falas sur la verketon de Stalin “kiel haroj sur supon“. Stalin ek-atakas *imperiismon k naci-regionismon*, li do ekatakas du superstiĉojn, kiuj *malhelpas mondunuecon de proletaro*. D. ekprofitprenas la okazon por ataki sennaciismon, antaŭpreparanton de tut-unueco proletara. Stalin tute ne denuncis, en sia verketo, iun eblan estontan sennaciismon. Li eĉ laŭde aludis la malproksiman estonton, dum kiu homaro posedos unuecajn lingvon k kulturon. Mi vetas, ke li tute ĝojus, se li ekscius, ke sinceraj revoluciuloj jam kulturiĝas pro tia estonto, k jam nomas sin *sennaciuloj*. Fakte, sennaciismo povas ekzisti sen esti danĝero por unueco de l' tutmonda proletaro, dum por tiu sama unueco tutrusismo estas danĝero, kontraŭbatalata de Stalin, regionismoj estas danĝeroj, kontraŭbatalataj de Stalin.

La triono, kiun D. altrudis al klaraj paĝoj de Stalin, tute malutilas, nur provas pravigi la sintenon de SEU en la esp. movado. Stalin tute pravas en siaj atakoj kontraŭ riskoj de tutrusismo (imperiismo) k riskoj de regionpatriismoj (naciismoj) en Sovetio. Sovetoj evitos tiujn du rifojn. Drezen malpravas, provante utiligi kontraŭ sennaciismo, tendenco unueciga, la klaran broŝuron, en kiu Stalin nur *kontraŭ mal-unuec-iloj* batalas. *Jief.*

[1] Niakomprene, naciismo estas religio, sed imperiismo ne. Naciismo kiel ĉiu religio tendencas al ekspansio k sekve naskas logike imperiismon — tiom pli nature, ke la produktofortoj ankaŭ postulas tiun ekspansion. — *Red.*

Por terkulturado

mi pretas dungi 13—14-jaran germanon, esperanto-parolantan prefere; li dume lernos la francan. — Skribi al SAT, Paris, kiu transsendos.

MEMORNOTO

Represis el “LNE“

New Yorker Volkszeitung, 1. 2., Notoj el dagestana vilaĝo (dec. 30).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

The Daily Worker, London, 13. 2., 24. 2.; *Signalen*, Stokh., 12. 2., 19. 2.; *Sächs. Arb.-Zeitg.*, Leipzig, 6. 2.; *Le Semeur*, Falaise, 19. 2. (mencias “S-ulo“n); *Le Réveil Ouvrier*, Nancy, 18. 2.; *L'Effort*, Lyon, 14. 2.; *ITF-Bulteno*, Amsterd., febr. (rubr.).

Peresper. materialon enpresis:

Antaŭen, Zagorsk (USSR), 29. 1.

NIA POŜTO

10 662. — Rekomendas la “Fabeloj“n (H. z. M.), Izgur, “La Lab. Esp.“, Sekspsik. — *Red.*

???. — Iu sveda K-do Georg Aronson, Brogatan 3, la lokon li forgesis citi, sendis al ni abonmonon. Ni ne povas plenumi la mendon pro manko de la loko. Kiu sciigos ĝin al ni?

130. — La kot. mk. ni sendas nur post finpago de la tuta kot. En la Adm. vi validas kiel aktiva.

Abonoj. — La ¼-jaraj abonoj finiĝas. Estas tempo por renovigi.

8218. — Familianoj kune loĝantaj povas pagi la duonon de la kot. por pas. membroj, sed ili ne ricevas jarl. *Adm.*

KORESPONDADO

AŬSTRIO

K-dino Marie Steigel, Schule, *Pottenstein*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI, bfl, PM, ktp. — Resp. garantiata (16 066).

— Grupo de esperantistoj koresp. kĉl, prefere kun Sovetio, L, PK, PI. Adr.: Rosa Brumer, Traunfallgasse 254, *Attnang*.

GERMANIO

— 8 geknaboj k 12 Gek-doj koresp. kĉl, L, PI. Adr.: K-dino Erna Köhler, *Sebnitz/Sa.* Nr. 44.

— Interrilatojn kĉl serĉas 25 gelaboristoj, pri prol. edukado, vegetarismo, lib. korpkulturo, socialismo ktp. Adr.: Jos. Allinger, Fridhof, *Karlsruhe/Rh.*

K-doj Fritz Spindler, Nerbergstr. 34, k Heinrich Kunzmann, Innerer Graben 25, *Würzburg*, kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. gar.

NEDERLANDO

K-do H. A. Kroonder (24 j. fraŭlo), Hoofdweg 311, *Amsterdam (W)*, kĉl, pri ĉ. t.

ENHAVO

	paĝo
Al la tuta SAT-anaro!	193—94
Al dogmuloj!	194
Antaŭ 60 jaroj	195
Neniu tuŝu al Sovetio!	196
La klasbatalo tra la mondo	196—97
La esperanto de la okuloj	196
Tago el mia vivo	197
Amu vian proksimulon!	197—98
Kio estas “Normala Horo“?	198
Pri modo k laboristaro	198
Mi volas scii	198
Tra Esperantio	199-200

Abontarifo al Sennaciulo: Argentino, pes. 6; Aŭstrio, ŝil. 12; Belgio, belgoj 12; Brazilio, milrejs. 18; Britio, ŝil. 9; Bulgario, lev. 250; Ĉeĥoslovakio, kr. 60; Danio, kr. 10; Estonio, kr. 8; Finnlando, mk. 80; Francio, fr. 40; Germanio, mk. 9; Hungario peng. 10; Italio, lir. 45; Japanio, jen. 5; Jugoslavio, din. 120; Latvio, lat. 10; Litovio, lid. 20; Nederlando, guld. 6; Norvegio, kr. 9; Polio, zlot. 15; Portugalio, esk. 40; Rumanio, lej. 350; Sovetio, rubl. 4,50; Svedio, kr. 9; Svisio, fr. 12; Usono dol. 2,50. — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon. MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio), poŝtĉek-konto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per ŝtataj monbiletoj en registrita letero aŭ per poŝtmandato.

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)